

Heinrich Heine,  
 [Ne scias mi, kio okazis]  
*tradukita de Paul Gottfried Christaller*

*El la "Libro de la kantoj", parto "La Reveno".*

Ne scias mi, kio okazis  
 al mia tristema kor':  
 Antikva legendo min kaptis,  
 ne cedas el mia memor'.

La Rejno fluadas trankvile  
 murmuras kiel mister',  
 la supron ŝtonegan orumas  
 sunbriloj de la vesper'.

Plej bela virgino jen sidas  
 mirinda sur la montet'  
 kaj ŝia oraĵo radias,<sup>4</sup>  
 ŝi logas kiel magnet'.

Ŝi kombas la oran hararon  
 abundan per ora kombil',  
 kantante misteran lidon,<sup>5</sup>  
 ravantan kiel sunbril'.

Ŝipisto en sia ŝipeto  
 kaptiĝas per stranga dolor',  
 la rifon li tute ignoras.  
 atentas nur ŝin kun fervor'.

Mi kredas: la ondoj englutas<sup>6</sup>  
 ŝipiston, ŝipeton je l' fin',  
 kaj kulpa pri tio nur estas  
 kantado de la virin'.

...

Heinrich Heine,  
 Lorelej  
*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

Ne scias mi, kial subita  
 malgaj' en la koro naskiĝis;  
 el tempo jam enterigita  
 legendo al mi reviviĝis.

Jam malvarmetiĝas l' aero,  
 la Rejno mallaŭte babilas,  
 per oro de l'sun' en vespero  
 la supro de l' monto rebrilas.

Plej belan knabinon mi vidas:  
 en ora ornamo brilante,  
 sur supro de l' monto ŝi sidas,  
 la harojn mistere kombante.

La oran kombilon ŝi movas  
 kaj kantas tra l' pura aero,  
 kaj forto mirinda sin trovas  
 en tiu ĉi kant' de l'vespero.

Ŝipet' iras sur la rivero,  
 ŝipisto ekstremis de l' kanto,  
 kaj blinda por ĉiu danĝero  
 rigardas li al la kantanto.

Ha, baldaŭ ŝipisto la bela  
 perdiĝis sub l' akvoturnado;  
 ĝin Lorelej' faris kruela,  
 per sia mirinda kantado.

...

<sup>4</sup>En la sube menciita kajero, el kiu mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi esperantigon, la linio tekstas: "kaj sia oraĵo radias", kun "sia" anstataŭ "ŝia". Tio ŝajne estas aŭ pres-eraro aŭ gramatika eraro de la tradukinto.

<sup>5</sup>En la origina versio troviĝas tie ĉi la vorto "liedon", kio estas aŭ pres-eraro aŭ neologismo inventita de la tradukinto Paul Christaller.

<sup>6</sup>Mi, Manfred Retzlaff, enmetis la duoblan punkton post la vorto "kredas". Ĝi mankas en la origina traduko de Paul Christaller.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de PAUL GOTTFRIED CHRISTALLER (\*1860-08-21 - †1950-12-31).*

*Arg-2-1116 (2010-09-13 10:03:39)*

*Mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi tradukon el la libreto "H. Heine - Libro de Kantoj", eldonita en 1911 de la "Esperanto-Propaganda Instituto" (Leipzig, Kaiser-Wilhelm-Str.15), 2a eldono. [Sur la frontpaĝo de la kajero estas malsupre indikita ankaŭ: Eldonejo Rothermel, Friedrichswerth (Thüringen) kaj supre: Popola Biblioteko Esperantista n-ro 2.] Die deutsche Urfassung von Heinrich Heine siehe: "Buch der Lieder", Abschnitt "Die Heimkehr". - Informoj pri la tradukinto Paul Christaller troviĝas en la vikipedia retejo [http://de.wikipedia.org/wiki/Paul\\_Gottfried\\_Christaller](http://de.wikipedia.org/wiki/Paul_Gottfried_Christaller), kun foto de li.*

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, \*1859-12-15 - †1917-04-14).*

*Arg-2-565 (2009-10-30 16:15:09)*

*Tiun ĉi tradukversion mi prenis el retejo <http://www.esperanto.mv.ru/Kolekto/Lorelej.html>.*